


Numero: 296.
Januaro 2017.

25-a jarkolekto

VESPERTO

Literaturaj folioj



Redaktanto
Apáti Kovács Béla
Kaposvár, Béla király u. 44. HU-7400
Telefona: 06/20/497-03-64
Retadreso: apatikb111@gmail.com
Eldonanto: KAPOŠVARA ESPERANTO-CENTRO
Lingve kontrolis: Erzsébet Tuboly

Mitimas la mondon

Dum la nokto de Silvestro, kiam proksimiĝis la noktomezo, min kaptis stranga sento. Mi ne komprenas ĝis nun, kial ĉi nokte mi pensis pri ĝi.

Kio okazos al Tero?

Ĉu ĝin pereigos iu fluganta asteroido veninte el la malhela kosmo. En la historio de nia terглоbo jam okazis simila. Onidire Tero jam plulfoje pereigis, sed ĉiufoje denove ekaperis la vivo.

Kio okazos, se ankaŭ ni homoj pereigos? Kio aŭ kiuj sekvos nin.

Mi legis aŭ aŭdis ie, se la dinosaŭroj ne malaperus de sur Tero, eble ili estus evoluintaj, kiel homo. Oni ne scias certe kio kaŭzis ilian malaperon. Multaj opinias, tiutempe nian terглоbon trafis giganta kosma ŝtono.

Nia tero estas minacata el la kosmo. Nia scio ankoraŭ malriĉa eliminiu ĉiun danĝeron. Vere la homaro klopodas solvi ĉiun problemon, sed ni homoj estas eta polvo en la vasta universo.

Ni ne povas solvi eĉ la pacan kunvivadon. Eterne ni militas, fabrikantaj novajn kaj novajn armilojn per kio ni povus ekstermi la tutan homaron dum kelkaj minutoj.

Kial fabriki ilon por murdi unu la alian? Kiu scias la respondon? Certe neniu povus respondi klare kaj trankvilige klarigi al ni, ke ĉi tiuj armiloj estas necesaj kaj ili servas la homaron.

Falsa bildo estas tio, se iu kredas per armiloj eblas solvi la problemojn. La armiloj alportas al ni nur larmojn kaj suferojn.

Estus bone vivi en tia mondo, kie ne ekzistas armiloj. La homo ne estas la malamiko de la homo. Ni kune laborus por ke la terглоbo estu vera florigardeno, kie vivi estas bone.

Homo, vekigu! Ni ne faru stultajojn! Kiu scias, kio okazos morgaŭ aŭ postmorgaŭ? For la militoj! Ni jam fariĝu plenaĝuloj!

Mi, kiel esperantisto deziras al ĉiu prosperan, sanan kaj pacan novan jaron por 2017. Krome mi deziras, nia amata lingvo Esperanto disvastiĝu en ĉiu lando kaj tereno de Tero.

— Redaktanto —



Azeno lernas lingvon

Azeno decidis lerni lingvon. Laŭ ĝi sen lingvoscio jam ankaŭ azeno ne povas ekzisti. Eksterlande scii iun fremdan lingvon estas tre tre necese. Kiu ne parolas fremdajn lingvojn, tiu perdiĝas, ne povas komuniki kun eksterlandaj azenoj.

Pasintjare ĝi estis en la lando de la ĝirafoj kaj ĝi ne povis kompreni sin kun la lokanoj.

Ĝi devis lui interpretiston pere de Internacia tradukservo-agentejo. La sendita papago parolis tiom rapide kaj kartave, ke ĝi apenaŭ komprenis ion el parolo. Kvankam ĝi bezonis trakti kun la tiea urbestro pri tre gravaj aferoj.

Ne nur la interpretado estis multekosta, sed ankaŭ la negoco fiaskis. Ĝi vane vojaĝis al tiu malproksima lando.

Hejmenveninte la azeno tuj decidis lerni iun mondolingvon.

Ĝia bofrato proponis al la azeno lerni la disvastiĝintan leonolingvon. Ĉi tiun mondon jam uzas kaj parolas preskaŭ la tuta bestaro. De la Norda poluso ĝis la Suda poluso ĉiu parolas leonolingvon. Nuntempe neniu besto povas vivi sen ĉi tiu grandioza kaj rapide ellernebla lingvo. Onidire ĝi povos ellerni ĝin dum kelkaj jaroj, se ĝi estos sufiĉe diligenta.

Do, la azeno komencis lerni la leonolingvon. Unue ĝi aĉetis la plej modernajn kaj multekostajn lernolibrojn kun diversaj helpiloj kompaktaj diskoj, vortaroj, specialaj lingvomaterialoj k.t.p.

— Estus la plej bone, se vi lernus ĝin de mem la leono — proponis al ĝi la bofrato. — Mi scias ĝian adreson, se vi deziras.

Kompreneble la azeno deziris kaj dankegis la helpon de sia bofrato.

La honorario de la lernohoro estis terure multekosta. La azeno kalkulis, se ĝi vizitos dum du jaroj la sinjoron profesoron, tiam ĝi devos ankaŭ forvendi sian domon, eĉ ankaŭ la belegan ĉareton.

Sed la azeno bone sciis, sen la scio de iu mondlingvo azeno ne povas vivi. Se ĝi volas fariĝi moderna ulo, tiam ĝi devas oferti.

En iu sunriĉa tago ĝi ekiris al la leono. Ĝi jam apenaŭ atendis la komencon de la lingvolernado.

La leono sidis en la ĝardeno sub ombra arbo kaj murmuris kolereme.

— Mia edzino denove bruligis la tagmanĝon kaj mi estas treege malsata. Ho, ĉi tie venas bela, dika azeno! Kiom bongusta manĝaĵo. Dio sendis ĝin al mi. Mi tre ŝatas la azenaĵon.

Antaŭ ol la azeno povintus diri, por kio ĝi venis, la leono manĝis la malfeliĉan beston.

Se oni ne atentis, la grandaj mondolingvoj manĝos nian kulturon kaj lingvon.

Do, ne revadu, ke iu mondolingvo solvos la lingvoproblemon de la homaro!

Onklino Mari

Apáti Kovács Béla

— Tria parto—

Kiam Bözsi foriris, la onklino Mari denove restis sola. Ŝi ne sciis, kion fari. Ŝi sentis, la familianoj atentis ŝin kaj ĉiam estas rigardaĉantoj ĉe la barilo. Kompreneble ili ĉiam aranĝas tiel la aferon, kvazaŭ ŝus ili estus alvenintaj tien.

Ŝi kaŝrigardis tra la fenestro. La maljunulino vidis, kiel Bözsi ĝuste rakontas al la onklino Terka la okazintaĵojn en la domo. Ŝi bone sciis, ke ŝia najbarino kolorigas la tutan renkontiĝon.

Ŝi sentis emon por malfermi la fenestron kaj elkrii:

— Bözsi, tion mi ne diris.

Sed Ŝi faris nenion. La onklino Mari nur rigadis la du virinojn. Ŝi ekridetis kaj reiris al la kuirejo.

Ŝi komencis preĝi. Ŝiaj lipoj malrapide movis, sed voĉo ne forlasis la buŝon.



La tagoj pasis unutone. Apenaŭ okazis io en la vilaĝo.

Bözsi vizitis foje – foje la maljunulinon, sed ŝi povis diri nenion novan. Fine jam vane ŝi kolorigis la okazintaĵojn, neniun interesis.

Oni diras, ĉiu miraklo daŭras tri tagojn. La vilaĝo komencis forgesiĝi pri la onklino Mari. Okazis aliaj pli interesaj eventoj.

Dum tagoj la interesiĝon de la vilaĝanoj vekis la rompŝtelo en la loka kooperativa nutraĵvendejo. Oni kaŝdiradis, ke la vendisto faris mem la ŝtelrompon por malaperigi la deficiton.

Por la polica detektivo estis tre suspektinda la vivmaniero de la vendisto. Pasintjare li feris sur la insulo Malto kun sia amikino. Antaŭ nelonge li aĉetis novan aŭtomobilon. Nur la blindulo ne vidis ĉi tion.

La vendisto faris ĉion tre lerte. La polica detektivo ne povis pruvi la suspekton.

Kompreneble la vilaĝanoj sciis ĉion, eĉ kelkaj propraokule vidis, kiam la vendisto nokte ŝtelrompis.

— Ĉu vi emas atesti tion? – demandis la polica detektivo.

Ekaŭdante ĉi tion ĉiu rifuzis fariĝi atestanto. Ili nur hejme paroladis pri la afero.

La novaĵojn pri la ŝtelrompo Bözsi portis al la onklino Mari.

— Kara najbarino – komencis Bözsi – en nia tempo ne okazis tia. Mi ne pensis pri Lajos (Lajoŝ=Ludoviko estis la nomo de la vendisto), ke li faras krion. Li ŝajnis de kapo ĝis piedplato sinjoro. Ĉiam li salutis min ĝentile kaj neniam li trompis min, kiam mi aĉetis ion en la vendejo.

— Jes, jes, Bözsi, la nuna mondo tre ŝanĝiĝis. La homoj fariĝis monstroj. Oni ne scias, kio loĝas en la homo – kapjesadis la onklino Mari.



Subite Bözsi ŝanĝis temon.

— Mari, ĉu vi aŭdis, morgaŭ vespere en la kulturdomo okazos prelego pri la ĝardenaj floroj. Konata profesoro Elek Nemezházy prelegos kaj montros lumbildojn, kiel kulturi florojn. Onidire li prezentos admirindajn bildojn pri Orientaj Aziaj kreskaĵoj kaj arboj. La sinjoro profesoro kvin jarojn vivis en Japanio. Mi proponas al vi venu kun mi al la kulturdomo. Certe ĝi estos interesa prelego.

— Ja, vi scias – ekĝemis la onklino Mari, sed ŝi ne povis daŭrigi.

— Jes, mi scias. Sed kial funebri konstante? Vi ne povos revivigi lin. Ĉu ne, Mari? Oni devas vivi.

— Oni devas vivi – ŝi ekĝemis kaj mutiĝis. Ŝi rigardis silente sian nigran antaŭtukon. Post kelkminuta cerbumado ŝi ekparolis – Ĉu mi iru?

— Ne hezitu! Venu! Mi garantias, vi bone fartos – kuraĝiĝis ŝin Bözsi.

Denove ili ambaŭ silentis. En la kuirejo estis aŭdebla la zumado de muŝo. Ĝi flugadis ĉe la fenestro serĉante la liberigon. Fine la onklino elbuŝigis:

— Estas en ordo. Mi akompanas vin.

— Fino —



POEZIO

William Auld

Anna

I

Anna, diskruta kaj enua,
per distra mano suprentiras
la ŝtrumpon, kaj pro l' hor' vakua
ion nebulan prisopiras,

kaj mi, sidante en proksimo,
ekvidas gambon filigranan
kaj, ekpulsante pro l' intimo,
lascive eksopiras Annan,

kaj premus kun avid' purpura
vizaĝon inter ŝiaj mamoj,
kusenaj mamoj de matura
graseta spertulin' pri amoj.

Kaj certe se mi entreprenus,
eĉ malgraŭ apatia stato
al sia sino ŝi min premus
pro simpatio kaj kompatio,

kaj lulus mian kapon milde
sur sia varmodora nudo,
kaj vartus dum momentoj ŝilde
min de l' turmenta vivokrudo.

Sed post miraklo de orgasmo –
mi bone scias – venus re la
eĉ pli profunda kormarismo.
Ne solvas splenon fulmo de la

kares' pasie senpasia:
mi strebas do al ekvilibro.
Anna, subite rekonscia,

babilas jam pri nova libro.

II

Anna, en ŝtrumpoj kaj kalson'
aspektas vere monumenta:
ŝveba ĝarden de Babilon'
ne estis tiom eminenta

kiom la mamoj, je muaro
skuitaj per plej milda mov'
kiel tremola foliaro
pro delikata ventoblov',

kaj la Melosa Afrodite,
de l' tuta mond' admirocentro,
ĵaluzus plej senintermite
pri l' ronda ĉarm' de ŝia ventro.

Sed Anna, antaŭ la spegul'
sin vidas preskaŭ kun malŝato
kaj zorge notas sen gratul'
la plivastiĝon de l' formato,

kaj sentas, ke forflugas viv'
kaj maljunaĝo venas froste;
sennombraj noktoj de lasciv'
kaj ĝu' volupta lasis poste

impreson malprecizan de
sencelo, vano kaj malriĉo;
ankoraŭ io mankas tre,
ŝin iel fintis plenumiĝo.

La lastajn vestojn ŝi demetas
(ebura gamb', ingvena ambro)
kaj post momento tualetas,
kantante gaje, en banĉambro.



Por infanoj



La malobeema kraĵono

Iam estis kolora kraĵono. Ĝi apartenis al knabeto, kiu tre ŝatis desegni. Lia ŝatokupo estis la desegnado.

Preskaŭ ĉiutage li desegnis. Kiu vidis ĉi tiujn bildojn, ĉiu admiris lin kaj laŭdis lian lertecon.

Ĉi tion enviis la kraĵono.

— Mi kuregadas sur la blanka papero. La knabeto nur prenas min — diris la kraĵono kolereme. — Mi meritis la laŭdon.



La kolora kraĵono decidis, ke ĝi ne obeos al sia sinjoro. Se la knabeto deziras desegni, tiam ĝi ne kuregos obeeme sur la blanka papero. Vere ĝi ne sciis, kiel ne plenumi la ordonon?

Postagmeze la knabeto venis hejmen el la lernejo. Li iris al sia ĉambro. Antaŭ ol lerni, li kutimis desegnadi almenaŭ duonhoron.

Hodiaŭ sur la strato li vidis belegajn ĉevalojn. Ili tiris ĉaron. Ĉi tion li decidis desegni. Kiom belega bildo ĝi estos sur la muro de la ĉambro. Certe liaj gepatroj laŭdos lin pro la bela desegnaĵo.

Li komforte altabliĝis, kiel alifoje, kaj volis ekdesegni.

Li prenis la kraĵoron kaj ĝian pinton li metis sur la blankan paperon. En tiu momento okazis akcidento. La pinto de la kraĵono rompiĝis.

La kraĵono ekridis:

— Nun desegnu, se vi povas!

La knabeto surpriziĝis. Nur tre malofte okazis, ke la pinto de la kraĵono rompiĝas. Bonŝance antaŭ nelonge la patrino de la knabeto aĉetis kraĵonpintigilon. Pri ĝi la kolora kraĵono ne sciis. Alifoje, se simila akcidento okazis, la knabeto devis

atendi ĝis la patro venos hejmen.

Nun ne tiel okazis. La knabeto prenis la kraĵonopintigilon kaj li faris novan pinton.

Ĉi tio ne plaĉis al ĝi. Ĝi kolereme ekĝemis:

— Kion vi faras knabo? Vane vi klopodas desegni, mi ne obeas.



La knabeto volis daŭrigi la desegnadon, sed apenaŭ tiris kelke da linioj la pinto de la kraĵono denove rompiĝis.

La kraĵono ekridis:

— Mi ne obeas al vi. Mi ne estos via servisto. Vane vi provadas.

La knabeto ne komprenis, kio okazis. Ankoraŭ simila ne okazis. Ofte horojn li povis desegni sen akcidento. „Eble la kraĵono estas forĵetindaĵo.” — li pensis, sed li denove faris pinton.

Ĉi tiu pintofarado estis doloriga al la kraĵono. Ĉiufoje ĝi fariĝis pli mallonga. Ĝi esperis, ke la knabeton enuigos la pintofarado kaj fine li ĉesos desegni aŭ serĉos alian kraĵonon. Ĝin li lasos trankvile.

Sed ne tiel okazis. Kiam la pinto rompiĝis la knabeto prenis la kraĵonopintigilon por fari novan.

Post kvaronhoro el la kraĵono restis tre mallonga objekto, kiun li apenaŭ povis preni per sia mano.

Tiam jam la kraĵono ne ĝojegis, kiel komence. Ĝi bedaŭris, ke ĝi estis malobeema kaj ne kunlaboris kun la knabeto.

Plurfoje en la vivo jam neniu deziras desegni per ĝi. Eble oni forĵetos ĝin. En la estonto ĝia hejmo estos en iu rubujo.

Terure!

Nenio estis farebla. La forpasintan tempon jam neniu redonos al ĝi.

Ĝi estis stulta.

Ĝi pensis, se ekribelos kontraŭ la knabeto, tiam ĝi estos la reĝo en la domo.

La malfeliĉa kraĵono amare esploris, kiam la knabeto iris el la ĉambro kaj ĝi restis sola.

— Onklo Adalberto —



Ni ridu!

Du ebruloj iras hejmen el la drinkejo. Ili jam iris almenaŭ tricent metrojn, kiam iu diras al la alia:

— Mi forgesis pisi.

Lia drinkemkamarado diras al li:

— Ne gravas amiko. Mi instruas al vi, kiel oni devas pisi.

— o —



Post la laboro agrabla estas la ripozo

— o —

Tri semajnoj

— Terure, ke post tri semajnoj mia edzino alveno hejmen.

— Ekde kiam ŝi forestas?

— Morgaŭ ŝi ekvojaĝos.

— o —



Ni ridu!

— Kiu povas diri al mi, kiam estas ĝustatempe rikolti la pomon en la fruktoĝardeno? — demandas la instruistino.

Knabeto anoncas sin:

— Kiam la dommastro ne estas hejme.

— o —



— o —

En la lernejo la instruistino diras al la gelernantoj:

— Diru al mi kvar norda- polusajn bestojn!

Peĉjo entuziasme anoncas sin.

— Nu, diru, Peĉjo!

— Unu foko kaj kvar blankaj ursoj.

— o —



